




KIAL LI DEVIGIS MIN KRESKI EN TIU ARBARO?
KIO OKAZUS AL MI, SE LA DU FILOJ DE GUSTAVO NE TROVUS MIN TIUMOMENTE?
NU, KIU ESTAS MI, DO? KAJ KIE MI NASKIĜIS? KAJ KIU NASKIS MIN, KAJ KIAM?
KIAJ ESTIS MIAJ PATRO KAJ PATRINO?
MI VOLAS EKSCII LA VERON!
PLAŬD
PLAŬD
PLAŬD


GUS-TAVO!
GUS-TA-VO!!
ĈU VERE VI?!
GUS-TA-VO!!
JOHA-NO...
ESTIS NUR VI...



RAVELIN DIRIS, KE ĈI TIU LOKO PLAĈIS AL GUSTAVO... LI ŜATIS PROMENI APUD LA LAGO.
MI PENSIS, KE VI ESTIS GUSTA-VO...
JES JA, ESTIS MI!
DUM KIOM DA TEMPO VI RESTOS TIE, MEZE DE LA LAGO?
HO, TIU LIBRO...
BEDAŬRINDE, MI ESTAS LA VIVANTA KOPIO DE MIA PATRO, AŬ TION ONI DIRAS. ANKAŬ RAVELIN FOJE KONFUZIS MIN KUN LI.
PER-MESU AL MI VIDI!
TAGLIBRO APARTE-NINTA AL NIA PATRO... NU, AL GUSTAVO.
LA TAGLIBRO ESTIS ĈE VI KIAM NI REN-KONTIS VIN EN TIU ARBARO. LI SKRIBIS PRI VI, MIKAELINO!



MI VOLAS EKSCII PRI MIA DEVENO!
SED VI JAM SCIAS MULTE! VI ESTAS EL BELKAUS, KAJ VI ESTAS LA RESPEKTINDA FILINO DE IU ARBARISTO.
NE! UNUE, VI NE SCIPOVAS LEGI, ĈU MI PRAVAS?
MI JA SCIPOVAS! MONTRU LA LIBRON AL MI!
BONVOLU NE ESTI MALAFABLA, JOHANO!
MI VOLAS NUR EKSCII KIAL GUSTAVO PERMESIS, KE MI KRESKU EN TIU IZOLITA ARBARO.
KIOM STULTA VI ESTAS! TUJ DEMETU DE VI TIUN MALSEKAN ROBON, AŬ VI MALSANIĜOS MORTE!
ŜANĜU VIAJN VESTOJN HEJME ANTAŬ OL VI EKLEGOS LA LIBRON!
POR VIA BONO, MI NE KONSILAS AL VI, KE VI LEGU ĜIN...


TIK TAK
コチコチコチ
MIKA-ELINO!
MONTRU TIUN LIBRON AL MI!
RA-VE-LIN!
HE... KION VI LEGAS TIEL ATEN-TE, MIKAE-LINO?
JEN LA TAGLI-BRO DE MIA PATRO!
MIKAELINO, KIU DONIS ĈI TION AL VI?



VI ERARAS!
MI ESTIS TIU, KIU PETEGIS HAVI LA LIBRON!
VIA SILENTO NE GRAVAS. MI SCIAS, KE MIA FRATO ESTIS TIU, KIU DONIS ĜIN AL VI!
...
RAVELIN!
ATENDU, RAVELIN!
LAŬRA, ĈU VI SCIAS, KIE ESTAS MIA FRATO?
SE MI NE ERARAS... LI ANKORAŬ NE VENIS EN LA DOMON...
JOHANO!!
KIE LI DONIS LA LIBRON AL VI?
EN LA BLANKA... LAGO...
HEEE, FRATO!
SED... KIAL LI DONIS TION AL MIKAELINO?
NUN KIAM ŜI FINFINE ALKUTIMIĜIS AL ĈI-TIEA VIVO!


KIEN DIABLE LI IRIS?!
JOHANO NE ESTAS ĈI TIE!
ĈU LI IRIS AL LA ARBARO DE MIKAELINO?
LASTATEMPE LI STRANGE MALAPERADAS... ĈU LI IRAS ĈIAM TIEN?
BUM
FAJRO!
LA SUBTERA ARBARO BRULAS!
KIA ODORO!
FUMO ELIĜAS EL LA PUTO!


FRATO!
KION VI FARAS?! ELIRU TUJ!
FRATO, KIO OKAZAS AL VI?!
EK!! LA FAJRO RAPIDE DISVASTIĜOS!


KRAK
KRAK


JOHANO, ATENTU!


AAAA! JOHA-NO!
RA-VE-LIN! ATEN-TON!



...
RAVELIN, ĈU VI FARTAS BONE?
TUS TUS TUS
ĈU VI VUNDI-ĜIS, RA-VELIN?
RA-VE...
JES! TUJ ELI-RU EL ĈI TIE!
LA ARBARO RAPIDE FOR-BRU-LOS!
JOHANO, ĈU VI FARTAS BONE?
BRR
BRR


JOHANO, LA TEG-MENTO!
LA ŜTONA TEG-MENTO TUJ FA-LOS SUR NIN!
KIO ESTAS TIU BRUO?
BRR
NI TRI MOR-TOS SUB ŜTONOJ EN ĈI TIU SUB-TERA AR-BARO...
SE LA TEG-MENTO EN-FALAS, KAJ NI RESTAS ĈI TIE...
MI DE-VAS SAVI ALMENAŬ MIKAE-LINON!
MIKA-ELINO!
NE TIMU MIN... MI NE VUN-DOS VIN. NUR NE TIMU MIN, MI PE-TEGAS...



MIKAELINO!
ĈU VI FARTAS BONE, MIKAELINO?
JES, JOHANO...
ĈU VI POVAS STARIĜI? PERMESU AL MI HELPI...
NE ESTAS BEZONATE. MI NE ESTAS TIOM MALFORTA.
RAVELIN!
ATENDU, MI HELPOS VIN!
SED MI NE ESTAS TIEL KURAĜA KIEL VI...
VERŜAJNE MIKAELINO ESTAS VIVA DANKE AL VI.
DO NI ĈIUJ BONFARTAS!
EN ORDO, NI ELIRU EL TIU ĈI ARBARO. ONI NE SCIAS ĈU OKAZOS ALIA ENFALO...



TIU ARBARO ESTIS BELEGA...
NUN ĜI ESTAS PLI SIMILA AL KOTOPLENA KAVERNO OL AL ARBARO.
MI KULPAS PRI LA FAJREGO.
MI NE POVAS KREDI, KE ESTIĜIS FAJRO EN SUBTERA ARBARO.
KIO POVIS OKAZI POR KE ĜI ESTIĜU?



MALGRAŬ LA FAJREGO KAJ LA EGA ENFALO DE ŜTONOJ, MI NE SENTIS TIMON. MI... MI SENTIS NENIOM DA TIMO.
KIEL STRANGE!
TIO, KION DIRIS MIKAELINO KIAM LA BRANĈO FALIS PRO LA FAJRO...
TIUJ VORTOJ RESONIS EN MIA KORO...
KIAL ŜI KRIIS LA NOMON DE MIA FRATO, SED NE LA MIAN?! KIAL LI PROTEKTIS ŜIN KIAM LA TEGMENTO ENFALIS?
JOHANO, ATENTU!
DO... KIAL?!
ĈU LI NE MALAMAS ŜIN?


SE TIU ARBARO NE EKZISTUS, NI NENIAM REKONTUS TIUN INON.
MI VOLIS NENIIGI TIUN ARBARON.
KIAL MI FARIS TION?
MI VOLIS MALAPERIGI ĜIN POR ĈIAM...
SEN ŜI, RAVELIN KAJ MI NUN KURUS EN LA KAMPARO SENZORGE.
KAJ ĈI TIUJ SUFOKAJ TAGOJ NENIAM OKAZUS.
BAC
TIU-MOMENTE...
MI ESTIS EN LA ARBARO, TUTE SOLA. KAJ MI PENSADIS.


ILI BRULAS!
ĈIUJ ARBOJ BRULAS NUN!
ĈI TIU ARBARO...
ĈI TIU ARBARO TUJ MALAPEROS!
DIO MIA! VI ESTAS KOVRITA DE KOTO, MIKAELINO!
RAVELIN KAJ JOHANO VENIS ANTAŬE, KAJ ILIAJ VESTOJ ESTIS SAME MALPURAJ.



MI PRIDEMANDIS ILIN, SED ILI NE MUTIĜIS. RAVELIN IRIS EN SIAN ĈAMBRON, KAJ JOHANO ELIRIS DENOVE.
KIO DIABLE OKAZIS, MIKAELINO?
...
HO, JES...
ANKAŬ VI NE POVAS PAROLI AL MI...
EN ORDO, NUN OKUPIĜU PRI ĈI TIUJ LAVOTAĴOJ!
LAVOTAĴOJ?
HMM! NE PROVU DIRI, KE VI NE SCIPOVAS FUNKCIIGI LAVMAŜINON!
VIA MASKO DE RIĈA FRAŬLINO NE PLU UTILAS, KARA.
BUM
HE HE, JES JA, MIKAELINO!
EKDE NUN VI FAROS DUONON DE MIAJ TASKOJ, ĈU BONE?
KLAK
KIO?! ĈU ŜI DENOVE NE LAVIS LA VESTOJN? TIU STEFANINO!


NU... KIEL ONI LAVU?
KIA DEMANDO! ONI METU LA TOLAĴOJN EN LA MAŜINON KAJ PREMU LA BUTONON.
ŜI NE SCIPOVAS LAVI TOLAĴOJN! KIAN EDUKON ŜI RICEVIS? VE, VE!
LA ARBARO NE PLU EKZISTAS...
TIU BELEGA ARBARO TURNIĜIS EN KOTA ŜTONEJO.
LI ESTIS TIU, KIU MALAPERIGIS LA ARBARON.
SED... IAL MI NE POVAS HAVI RANKORON KONTRAŬ JOHANO. MI SIMPLE NE POVAS...
LI PROTEKTIS MIN KIAM LA TEGMENTO DE LA SUBTERA ARBARO ENFALIS.
KAJ LI RIPETADIS MIAN NOMON...
CETERE...